

La Lando de Reĝino Maud (3)

Novelo de Zorĵa Danovskaĵa

Venis somero. Foje tagmeze la suno faligis pluvegon da blindigaj radioj sur la homojn, sur la maŝinojn, sur frakasitan teron. La maldekstra deklivo de la fosego malrapide ekrapis suben. Tie laboris homoj. Zinjo hastis en laŭvoja « Willys », la doktoro venis ĉirkaŭ du horojn poste. Dum kelkaj horoj oni helpis elfosi la kamaradojn. Neniu mortis, sed Zinjo kaj la doktoro ne dormis; la doktoro mem faris bandaĝojn, fiksis la bastojn. Al unu, grave vundita, estis necesa urĝa operacio — la doktoro faris ĝin tuj en la kampo. Zinjo helpis lin preskaŭ falante pro laco. Nur kiam ĉiuj suferintoj estis feliĉe ekspeditaj en hospitalon, ŝi povis ripozi kaj restis tranokti ĉe sektorejo en la tendo de l'laborestro. Iu zorgeme kovris ŝin per stabita vata jakko.

Zinjo estis dekorita per ordeno. Ŝi ne sentis sin heroino: nenion ŝi faris eksterordinaran. Ŝi alpinglis la ordenon al la nova bluzo el krepjorĵeto — la materialo diafana kaj facila kun intensa, ĝojspruca desegno, kiu plenigis ĉiujn butikojn de la konstruloko — kaj sur la flora desegno la ordeno ŝajnis esti granda floro. Oni multe aplaudis al ŝi. Ŝi nenion povis diri. Sia portreto aperis en la gazeto. Kaj jen ĉio. Sed la doktoro, la sama, kun kiu ŝi laboris dum la elfosado, komencis skribi al ŝi leterojn. Li skribis longe kaj inspire, rakontis pri si, pri sia laboro. Li estis bona junulo kaj multon vidis. Unu fojon semajne Zinjo ricevis koverton, en kiu nepre estis du folioj de papero, plenigitaj per etlittera densa skribo. Li skribis al ŝi pri tralegitaj libroj, pri viditaj kinofilmoj, pri homoj, pri vivo...

Sed Zinjo ne povis respondi al la leteroj. Tio ja ne estis leteroj de Andreo. Al li ŝi respondus. Same longe ŝi skribus pri la homoj, pri la vivo... La lando de reĝino Maud — kiel malproksime estis la tempo! Andreo pensis, ke ŝi fantazias, ke ŝi estas revulino; li eĉ ne volis ligi kun ŝi sian vivon. Ion ŝi ne komprenis tiam, ion grandan kaj

tre gravan. Nun ŝi komprenus tion. Nun ŝi mem partoprenis en la granda vera vivo. Ne elpensitaj, sed realaj estas la herooj ĉi tie, kaj ili akceptis ŝin, kiel la egalulon; ili alte taksis ŝian etan, sed tiom fortan koron, ili donis al ŝi parton de sia gloro...

La stepo silentis. La noktoj estis longaj kaj senlumaj. Enpremite la vizaĝon en flatan malmolan kusenon (mankis tempo por frape pufigi ĝin), Zinjo malĝojis pri la feliĉo, kiu ne plu estos. Sed tage ŝi forgesis pri tio, tage mankis tempo por pensoj pri si mem. Kiam matene en malmola kuvo de la renversebla kamiono, kovrita per pecoj de alsekiĝinta argilo, ŝi veturis al la sektorcentro, ŝi subite eksentis sin parto de la arda seka stepo kaj de fora ĝishorizonta vastto.

Ŝi revenis en la gepatran urbon ĉe tagiĝo. Stacidome ŝi prenis taksion. Hejme ĉio estis, kiel antaŭe. Same klopodis la patrino, kaj sur la muro pendis granda mapo. La pupoj de Zinjo sidis sur la kanapo en severa, dum jaroj konstituita ordo. Ĉio, ĉio estis sama, nur Zinjo estis alia.

Vidinte la ordenon, la patrino svingis la manojn. Nenion similan skribis pri si la filino. Alvenis najbarinoj, la patrino de Andreo.

Ili demandis ŝin: « Kien do nun, Zinjo kara? ».

Kien nun? Ŝi ankoraŭ ne sciis. La konstruo estas finita. Zinjo estas libera elekti mem sian lokon en la vivo. Por ke estu same bone! Por fari ion grandan, necesan... Ŝi iris al la distrikta komitato de Junkomunista Ligo.

Kaj tiel okazis, ke frumatene Zinjo supreniris ŝtuparon de motorŝipo foriranta al Antarktiko. Do, tamen ekzistas la lando, nomita laŭ nomo de iu reĝino, la lando, kiu